

ESPERANTO

TRIUMFANTA

SEMAJNA

Internacia

Neŭtrala

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gill Noria, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)


REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Felletona red.: Zanon.

ADMINISTRISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Postĉekkonto Köln 70868, por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ
po cm², 0.10 svisa franko (aŭ ĉe antaŭpago 6 gmk.)
Rabato laŭ interkonsento.

MALBONVALUTULOJ
ateniu la
NOVAJN PREZOJN
por abono kaj reklamo!

Numero 92 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 9. Julio 1922.




FINNA ARTO

Pentraĵoj de famaj finnaj majstroj.

Maldekstre:
Torfistoj ĉe sia laboro.
De *Eero Järnefeldt*.

Dekstre:
Hejmveturo de la laboro.
De *Pekka Halonen*.



Henriko Demont kaj lia verko.

Meze de la aparte gravaj cirkonstancoj, kiujn ni travivas, pro la konfliktoj, kiuj ankoraŭ minacas la pacon de l' mondo, ni opinias, ke nia devo estas atentigi ĉiujn pri la saviga rimedo, kiun rekomendas Henriko Demont.

Ni diru do malmultvorte, kiu estas Henriko Demont, kaj precipe, kio estas lia verko.

Henriko Demont estas Advokato ĉe la Pariza apelacia kortumo, kiu partoprenis la tutan militon de 1914—1918. Li ne estis, verdire, frapita de la kugloj nek de la obusoj. Sed li suferis la sufokantajn gasojn, kiuj difektigis por ĉiam lian sanon. Kaj pro la hombuĉadoj, kiujn li partoprenis, ĉar li vidis mortfali apud li siajn plej bonajn kamaradojn, ĉar li pripensis pri la kruelaj funebroj, kiujn ĉiuj tiuj perdoj estis okazigontaj ĉe tiom da familioj, li juris al si, ke, se li estos sufiĉe bonŝanca por sin forŝovi de la danĝero, li dediĉos ĉiujn fortojn de sia koro kaj de sia saĝo por provi malhelpi por ĉiam la revenon de tiaj abomenindaj.

Kaj jen kial eĉ antaŭ la militpaŭzo, li skribis gravan leteron al Prezidanto Wilson por peti de

li, ke li bonvolu iniciati la starigon de la vere generala Societo de l' Nacioj.

Oni scias, kio okazis. La Societo de l' Nacioj naskiĝis. Ĝi jam multe bonfaris, kaj oni rajte povas apogi sur ĝi la plej bonajn esperojn.

Sed, por ke la mondo konklude povu ĝui tiun netakseblan feliĉon, pri kiu ĝi de tiom longe sopiras: „la paco inter ĉiuj por ĉiam“, estas necese havigi al la nuna Societo de l' Nacioj la rimedon forigi el ĝia regularo bedaŭrindegan paragrafon, kiun eviti ne estis en ĝia povo. Ne nur efektive la nuna kontrakto de la Societo de l' Nacioj ne enhavas la definitivan kaj absolutan malpermeson inter la popoloj de tiu abomeninda krimo: la milito; sed, krome, ĝin devigis la perforto mem de l' aferoj konfesi, ke por la popoloj estas ankoraŭ okazoj, en kiuj ili ne havas alian elektaĵon por respektigi siajn rajtojn, ol sin turni al tiu malhumana rimedo, kiun solan konsis niaj praavoj antaŭ jam tre longe por solvi siajn individuajn malakordojn: la juĝo de la armiloj, kiun oni nomas por la popoloj per tiu funebra vorto: la milito, kiu devigas ilin masbuĉigi la plej grandan parton de tiuj, kiuj estas la plej junaj kaj la plej bonaj el iliaj regatoj.

La milito do estas ĉiam ebla. Kaj tro da antaŭsignoj nun kunigas por montri, ke la venonta povas esti baldaŭ.

Tial Henriko Demont prave konsideris, ke ne nur lia tasko ne estas plenumita, sed kontraŭe, ke ĝi nur komencas. Kaj por daŭrigi ĝian realigon, li verkis unue tiun admirindan libron: „Por forigi tiun krimon: la milito“, kiun ĉiuj devas legi, kaj en kiu li vidigas, ke por la popoloj, same kiel por la individuoj, povas esti leĝoj, tribunaloj kaj policanoj por malhelpi, kaj se bezone, por puni krimulojn kaj neobeintojn al la leĝoj, kaj aliflanke ke per saĝa finanssistemo oni povas malaperigi tiun monan turmentilon, nome la ŝuldojn, kiuj subpremas preskaŭ ĉiujn naciojn kaj estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de la inter popoloj ankoraŭ eblaj konfliktoj.

Kaj nun, nova pilgrimanto, Henriko Demont iras ĉien, petante de ĉiuj, ke oni bonvolu helpi lin starigi, tra la tuta mondo, grandan universalan Asocion por la forigo de l' militoj, kiu helpante la nunan Societon de l' Nacioj fariĝi kio ĝi devas fariĝi: La vere generala Societo de l' Nacioj plifaciligu al ĝi forigi por ĉiam tiun krimon: la milito!

Efektive la „Herrenberg“ (monto de l' sinjoro) estas la plej alta, kies perspektivo estas limigata sur unu flanko de bela lago, sur la alia de densaj arbaroj.

Kompreneble en la popolkredo la grato pluenvivadas kaj dum ventegaj tagoj kaj noktoj li fantome furiozas tra la lando; tiam la loĝantaro kune kaŭras er: siaj kabanoj kaj dometoj, timeme rigardante al la tombomonto de l' sovaĝa grafo.

II. La „Matternoj“. (1496—1516)

Danzigo iam estis unu el la plej riĉaj hanso-urboj. La gigantaj arbotrunkoj, kiuj kunigitaj al grandegaj flosoj estis transportataj sur la riverego „Vistulo“ el la preskaŭ neelĉerpeblaj arba egoj polaj, kaj kiuj alportis sur siaj larĝaj dorsoj mil kaj mil da unuoj de orkolora tritiko al la Danzigaj tenejoj, estis neniam sekigonta fonto de riĉeco kaj bonstato.

Malgraŭ tio ankaŭ por Danzigo ekzistis tempoj de gravaj zorgoj, ĉagrenoj kaj malĝojoj. La urbo kontraŭ eksteraj malamikoj dank' al siaj fortikaj muroj, remparoj, fortikajetoj kaj dank' al sia ĉiam preta civitana armeo ja bone estis ŝirmita kaj ĉiujfoje sukcesis venki tiujn atakintojn, sed grandaj zorgoj kaj ĉagrenoj atakis la urbanarojn, se rabistoj kaj ĉuspecaj kanajlaro kaj vagistoj baris la ĉefajn komercajn stratojn.

La marvojo, precipe tiu tra la „Sundo“, ĉiam estis objekto de grandaj zorgoj. Oni daŭre estis timonta atakojn de marrabistoj, kaj nur tre malofte riskis unuopa ŝipo forlasi la havenon; plej ofte ili arigis al grandaj grupoj da okdek kaj pli kaj nur komencis la vojaĝojn, akompanataj per kelkaj laŭmilita armita ŝipoj.

Sed Henriko Demont povas sukcesi nur, se ĉie ĉiu konsentas forigi tiun apation kaj tiun timemon, kiuj tro ofte haltigas tiujn mem, kiuj estas la plej interesataj je la bonordo kaj je la progreso, kaj estas kaŭzo, ke preskaŭ ili ne kontraŭstaras kontraŭ la incitantaĉoj al la malbonordo.

Kaj jen kial, koncerne nin, ni deziregis atentigi ĉiujn pri la verko de Henriko Demont kaj kial ni kiel eble plej laŭte diras al ili, je la tuta forto de nia konvinko:

„Patroj, patrinoj, fratoj, fratinoj, edzinoj, kiuj perdis unu el la viaj dum la 1914—1918 milito, kaj vi precipe, gepatroj kaj geavoj, kiuj prave timegas por viaj infanoj kaj nepoj, se vere vi abomenegas la militojn, se vi volas, ke la ofero farita de tiuj, pri kiuj vi ploras kaj kies memoron vi pie konservas, se vi deziregas, ke tiuj, kiuj postrestas aŭ de tiam naskiĝis al vi, ne estu iun tagon, eble tro proksiman, meze de la danĝeroj de nova milito ankoraŭ centfoje pli terurega ol tiu, el kiu apenaŭ ni eliras, rapide grupiĝu ĉiuj ĉirkaŭ Henriko Demont!“

Kaj kiel li, ekkriu vi ĉiuj kun ni per la tuta forto de viaj pulmoj: „For la militon! kaj vivu la paco de la juro kaj per la justeco!“

Beauvais (Oise), Francujo, la 16. Junio 1922.

L. Demarcy
Jura Licencito
Prez.fondinto de la Esp. Grupo.
Represota nacilingve de ĉiuj pacamantaj gazetoj.

Grava Sciigo!

La karavano Lübeck-Helsinki ne okazos, tamen la antaŭkongreso.

Nia projekto aranĝi karavanon al Helsinki laŭ „modestaj prezoj kaj tiel subteni la Universalan Kongreson, malsukcesis pro la indiferenteco kaj prokrastemo de la Esperantistoj. Ĝis la mezo de junio, ĝis kiam ni devis pagi al la ŝipkompanio garantian sumon de 500 000 gmk alligis nur 12 (deku) kongresanoj. Tial la ŝipkompanio ekasigis la kontrakto kun ni. Pro tiaj malbonaj ŝancoj (ĝis fino de junio la nombro de la aliĝintoj alligis nur je 23 kaj kelkaj necertaj prometoj) neniu alla ŝipkompanio estas trovebla, kiu sendos Esperantistan ŝipon al Helsinki laŭ niaj proponoj. Do ni ĉesos nian laboron en ĉi tiu direkto. Tamen ni helpos al ĉiuj kongresanoj,

Ankaŭ la landvojoj ne ĉiam estis tute sekraj, precipe kiam aperis „anonciĝinta malamiko“, kiu pro la kaŭzo sin kredis malprofitigita kaj pro tio programane al la urbo deklariaciis malpaco.

Anonciĝinta malamiko estis tiu, kiuj al siaj kontraŭuloj skribe anoncis la malamikecon. Per tio nek estraro nek magistrato estis ratiĝita, sin intermiksi en tian malpaco. La skribe anoncita malamikeco estis transdonata per sekretaj senditoj. La loĝantaro de la urboj nefortikigitaj timtremadis je la nura penso pri la danĝero de tia malpaco kaj volonte kontraktis kun tia malamiko en ofte tute malinda, ilin humiliganta maniero.

Ankaŭ Danzigo dum dudek jaroj staris sub la jugo de du el tiaj bruligistoj-rabistoj, sub la sklavoeco de la fratoj Gregor kaj Simon Mattern.

Kun tiaj malitmo kaj malrespekto ili praktikis sian metion, pravas jena letero:

„Urbestro kaj konsilantaro de la urbo Danzigo!
Mi ne dubas, ke vi eksciis, ke mi kaptis anon de via konsilantaro, kiu pro urhaj aferoj estis forvojaĝinta.

Por lia liberigo mi postulas reaĉetan sumon de 50 000 hungaraj florenoj.

Se vi ne pagos tiun sumon, mi ĉiutage fortranĉigos parton de lia korpo, pendigos tiujn partojn al ŝnuro, kiun mi sendos al vi, por ke vi ĉiutage povu preĝi antaŭ ili vian „Patro-Nian“.

Skribita en mia verda kastelo (li opiniis sian arbarsolecon) laŭdon post pentekosto de l' jaro 1499.

Gregor Mattern,
anonciĝinta malamiko.“

Pri tiu „anoncinta malamikeco“ en neniu leĝolibro, en neniu kodo oni trovas eĉ unu vorton, kaj tamen ĝi valoris kvazaŭ io permesita, io komprenebla.

Danzigo.

Rakontoj de Prof. Schultz.
Esperantigis Otto Emmert.

I.

La sovaĝa Grafo.

Kelkajn mejlojn malproksime de Danzigo, kie la terlangoj „Hela“ interligiĝas kun la kontinento, troviĝas la vilaĝo „Krokow“ (elpar. Kroko) kun forta malnova kastelo.

Depost preskaŭ ok jarcentoj ĉi tie estas la prapatra sidejo de la plej maljuna samnoma nobelaro de Okcidentprusio.

En tiu ĉi kastelo, kiun ankoraŭ nun ĉirkaŭas fortikaj fosoj kaj fortaj remparoj, kies dikaj muroj kontraŭstaris al ĉiuj atakoj, kaj el kies paffendoj nin salutas jam de longe korodiĝintaj kanontuboj, en kies kelarkoj jam ekestas stalaktitoj, en tiu ĉi kastelo historio fariĝis legendo kaj legendo historio.

Neniu grava okazintaĵo en Eŭropo ekzistas, al kiu la familio Krokow ne estas en iu a'n rilato. El la granda nombro da tradicioj mi hodiaŭ nur citas feblon, kiu apartenas al la plej novaj kaj kiu apenaŭ estas centjara; pruvo, kiel inter malriĉa, modeste vivanta loĝantaro pri eminentaj personoj tuj aŭ baldaŭ post ilia morto ekestas legendo.

Kiam la skribinto de tiuj ĉi linioj la unuan fojon vizitis tiun kastelon pro scienca prilaborado de la grandvalora dokumentaro, al mirinde bela aŭtunotago sekvis tiel forta uragano, kiel ĝi eĉ en tiu ĉi ventegoriĉa regiono estis maloftaĵo. Nur malrapide mi povis marŝadi, kaj nur en sufiĉe malfrua vesperohoro mi venis trans flankan ponton de la fortikaj fosoj sur pli mallongan vojon al la gastelo de l' vilaĝo, por tie pasigi la nokton.

Fraksenoj kaj kverkoj bruegis, kaj la ventego skuis la maljunajn arbojn, amase terenjetante sekigintajn branĉojn kaj branĉetojn, kvazaŭ ĝi volus elradikigi ilin.

Fajfante, muĝante kaj siblante ĝi furiozis ĉirkaŭ la turetoj kaj balkonajoj de la kastelo kaj ĉirkaŭ la turo de la apuda preĝejo, rampis sub ĉevronojn kaj tegolojn, kaj mokridante pri la homaj faritaĵoj ĝi terenjetis tegolojn kaj ĉevronerojn.

Kun tiu infera bruado kunigis la obtuze-raŭkaj krioj de gufoj kaj strigoj, kiuj hodiaŭ sin sentis treege malsekuraĵ en nestoj kaj nestegoj; en ĉio miksiĝis la fajfanta kriegado de la ventegoflagoj sur la tegmentoj.

Matene, kiam mi trinkis mian kafon en la gastelo, kompreneble oni parolis pri la dumnokta inferkoncerto, kaj la bonkora gastejestro, kompletigis niajn interparolojn per la vortoj: „Ĉi tiun nokton la sovaĝa grafo refoje furiozis tra la landoj.“

Kiam mi venis al la kastelo, mi demandis pri tiu rimarko pri „la sovaĝa grafo“ kaj ricevis la jenan respondon:

La sovaĝa grafo estis grafo Albert-Kaspar-Ewald de Krokow, mortiinta en la jaro 1823. Li estis viro de sovaĝa, kolera karaktero kaj ĉiutage surĉevalo trakuregis ĉiujn siajn bienposedaĵojn de 1½ kvadratkilometra amplekso, kaj per vipobatoj traktadis siajn kamlaboristojn, kiam okaze li trovis ilin mallaborantaj, por aliloke plenumi la saman oficon.

Laŭ sia migrema karaktero malripozema li ne povis atendi longtempan vivon, sed la penso, iam ripozadi en la kapela tomo de siaj prapatroj, ŝajnis al li netolerebla. Pro tio li testamentis, ke li estu enterigata sur la plej alta montosupro de siaj posedaĵoj, sur loko, de kiu li povus pririgardi ĉiudirekten siajn bienojn.

kiuj uzos la regulajn finnajn vaporŝipojn elirantajn el Lübeck aŭ Stettin. Por la aliĝintoj al nia mis-sukcesinta karavano ni jam luis lokojn sur la nomitaj ŝipoj. Ankaŭ por la plej venontaj ni zorgos.

La programo de la antaŭkongresoj en Hamburg kaj Lübeck ne estas tuŝata per la malsukceso de la karavano; ĉar ja la plej multaj kongresanoj vojaĝantaj al Helsinki, devas trapasi tiujn urbojn. Tial la gesamideanoj, kiuj ne havas sufiĉe da mono por viziti la Universalan Kongreson en Helsinki, trovas ĉe ni riĉan internacian vivon en samideana rondo. Ĝis nun aliĝis krom germanoj: angloj, aŭstrianoj, belgo, bulgaroj, ĉeĥoj, danoj, francoj, holandoj, hungaroj, poloj, rumanoj, skotoj kaj svioj.

La vojaĝantoj al la Universala Kongreso for-lasos Lübeck laŭ deziro: a) per la ŝipo „Mira“ la 5. aŭgusto je 2 h. pt.; b) la 5. aŭgusto, matene 9²⁰ per vagonaro al Stettin, tie uzante la ŝipon „Rügen“ je 4 h. pt.; c) la 5. aŭgusto, matene 9²² tra Sassnitz-Trelleborg al Stockholm, tie uzante la 6. aŭgusto je la 7 h. vespere la ŝipon „Birger Jarl“. Ĉiuj ŝipoj alvenos ĝustatempe en Helsinki. Detalajn informojn donos nia komitato, kiu ankaŭ peras biletojn por la vagonaroj kaj ŝipoj. Al demandoj aldonu monbiletojn por la respondo!

Dr. A. Möbusz, Lübeck.

XIV-a Universala Kongreso de Esperanto kaj

VIII-a Kongreso de Universala Esp. Asocio en Helsinki-Helsingfors, Finnlando 8.—16. aŭgusto 1922.

XI-a Komunikio.

Kelkaj klarigoj kaj sciigoj. Lübecka karavano malsukcesis. Malgraŭ la persistaj klopodoj de niaj kunhelpantoj en Lübeck, s-oj Heinrich Selmer kaj d-ro A. Möbusz, ĉi tiu karavano ne povis efektivigi. Plej grava kaŭzo al la bedaŭrinda falo de la projekto estis nesufiĉa anonciĝo. Tamen la aliĝintoj al la Lübecka karavano ne perdis ion, ĉar la Kongresa Komitato de Lübeck prizorgas la ŝipokojn por ili laŭ la favorokondiĉoj de kongresanoj. Por tiuj, kiuj eble kalkulis je la Lübecka karavano, ni atentigas laŭ niaj komunikoj pri jenaj uzablaj linioj:

El *Stettin* ekveturos ŝipo „Ariadne“ merkredon la 2. 8. je 1 h. tage, alvenante al Helsinki vendredon la 4. 8. tage. Lokoj: I-a kl. 182, II-a kl. 74, III-a kl. 12. Prezoj: I-a kl. 720.— fmk., II-a kl. 640.— fmk., ambaŭ kun lito kaj manĝo, III-a kl. 280.— fmk. kun lito sed sen manĝo. Manĝon oni povas ricevi por 50.— fmk., potage.

El *Stettin* ekveturos ankaŭ ŝipo „Rügen“ sabaton la 5. 8. je 4 h. pm., alvenante al Helsinki lundon la 7. 8. matene. Lokoj: I-a kl. 208, III-a klaso 58 (dua klaso ne ekzistas). Prezoj: *Stettin*—Helsinki I-a kl. 4000 fmk., III-a kl. 8200 fmk.; Helsinki—*Stettin* I-a kl. 720 fmk., III-a kl. 600 fmk.

Holtenau. Kieĉ-Kanalo—Helsinki per „Arcturus“ (la 5. aŭgusto frumatene) aŭ „Astraea“, ĉiuj sabate frumatene. Prezo: III-a kl. 280 fmk. kun lito kaj manĝo. Reveturo ĉiumerkrede, sama prezo. Agento: Gläcke & Henning, Holtenau.

El *Riga* al Helsinki ekveturos la ŝipo „Malland“ sabaton la 5. 8. je 5 h. posttagmeze kaj reen ĉiumerkrede je 2 h. nokte. Lokoj I, II, III, po 20. Prezoj: I 400.— fmk., II 340.—, III 220.— (lasta sen manĝo).

Tallinnaj samideanoj luis specialan ŝipon „Kungla“, kiu alportos la kongresanojn el *Tallin* (Reval) al Helsinki kaj reen. Prezoj: Iro kaj reveno por

la anoj de Esp. societoj de Estonio 900.— emk., por la eksterlandanoj 150.— fmk. (35.— fr. fk.); nur iro Tallinn—Helsinki aŭ nur reveno 800.— emk. (20.— fr. fk.). Kongresanoj, kiuj volas uzi la Tallinnan linion estas petataj pagi almenaŭ duonon de la biletprezto tuj ĉe la mendo de la loko. Sin turnu al „Espero“, Tallinn, Postkast. 6.

Samtempe ni atentigas, ke la kongresanoj ricevos rabaton sur la ŝipoj ankaŭ post la templimo de 6 semajnoj. Ĝis tiam nur ĉiuj lokoj estos rezervitaj por la kongresanoj, sed poste oni ne garantias, ĉu restos liberaj lokoj.

Rabato sur fervojoj en Finnlando. Laŭ la promeso de la fervojministro la Registaro donos je la kongresaj ekskursoj rabaton de 50%. Tio ebligas al pli multaj personoj la partoprenon en antaŭ- kaj postkongresaj rondvojaĝoj en Finnlando.

La alta protektanto de la Kongreso, la prezidento de Finnlando, akceptos en sia palaco la reprezentantojn de diversaj nacioj.

La gazetaro estas favora. Pluraj gazetoj kaj revuoj esprimis sian favoron, promesante eldoni apartajn kongresnumerojn. Ni mencias sekvantajn: Teknillinen aikakauslehti (Teknika Revuo), Suomen Kuvalehti (Ilustrita Ĵurnalo de Finnlando), Suomen Postimerkkilehti (Finnlanda filatelista ĵurnalo), Suomen Urheilulehti (Finnlanda Sporta Revuo), Plue ĉiuj ĉefurbaj taggazetoj publikigos kongresajn novaĵojn, eĉ iuj aranĝos dum la kongreso apartan komunikon en Esperanto sur difinitaj kolonoj ĉiutage.

Preparaj laboroj bone progresas. La XIV-a okazos en signoj de serioza laboro; certe oni tamen ne lasos sen prizorgo ankaŭ la amuzajn programojn.

La Loka Kongresa Komitato.

Adreso: Poŝta (ankaŭ por monsendoj): XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinki, Finnlando. Telegrafa: Esperanto, Helsingfors.

Internacia Esperanto-Kongreso en Varsovio!

La Unua Tutpola Esperanto-Kongreso decidis unuvokce inviti la XV-an Internacian Esperanto-Kongreson al Varsovio.

Tutmondo! Ĉu enhavas vi iun kreaĵon, kiu ne aplaudos je tiu ĉi ideo? Ĉu troviĝas eĉ en la plej ekstreme, plej kaŝita angulo de l' mondo iu, kiu estas malkontenta pro tio? Ĉu kuraĝos eĉ nnu el ĉiuj kongresanoj en Helsingfors kontraŭstari tiun decidon?

Pli ol certa mi estas, ke la okuloj de l' tuta mondo estas turnitaj al Varsovio. Ke ĉe l' aŭdo de tiu ĉi nomo la koroj de ĉiuj samidanoj ekbatas pli forte. Ke la revo de ĉiu Esperantisto estas: vidi Varsovion kaj... vivi! Ke ĉiu paca batalanta havas kiel plej ardan deziron viziti Varsovion. Ke la mondo tiel soifas, kaj tiel avidas tiun ĉi urbon, kela Esperantistaro tiel senpacience atendas, ke sufiĉos nur unu voketo: *Venu*, kaj ĉiuj alflugos, ĉiuj alkuoros, ĉiuj aperos.

Samideanoj, la revo faktiĝis: la voko alvenis. Ni, samideanoj el Varsovio, invitas vin: *Venu*, vidu kaj nia ideo venkos.

Ĉu troviĝas iu malkontenta! Ĉu estas iu, kiu ne volas?

Ĉu kuraĝos iu rifuzi al Varsovio, havi la ĝojon reakcepti sian infanon, kiu „post foresto multjara“ elkreskis je belega viro? Ĉu povus iu kontraŭdiri ion je la feliĉo, kiun ĝuas Varsovio, gastigante tiom multe da adorantoj de ĝia filo? Ĉu troviĝas la estajo, kiu rezignus je l' plezuraj partopreni en honorigo de l' tombo de nia kara Majstro? Ĉu en la tuta mondo ekzistas eĉ unu Esperantisto, kiu ne volus ĉestigi la malfermon de l' tiel longe sopirata monumento al nia Majstro?

Ne, ni tion ne imagas.

Proksime de la „Sankta katedralo“ troviĝas la lama vilaĝpreĝejo — nun la protestanta preĝejo de Oliva.

Dum la pompan katedralon monaĥejan nur vizitadis monaĥoj, nobeluloj kaj kavaliroj, en tiu modesta preĝejo kunvenis al Diservo la vilaĝanoj kaj fiŝistoj de la ĉirkaŭaĵo.

Modesta estas tiu preĝejo kaj tute similas per sia superpendanta tegmento al kokino, kiu sub siaj flugiloj ŝirmkaŝas sian idaron.

Modesta ankaŭ estas ĝia ĉirkaŭaĵo. Verda herbotapiŝo ĝin ĉirkaŭas kaj etendiĝas per malkruta deklivo ĝis proksima rivereto.

Sed precipe tiu ĉi deklivo havas grandan nacian signifon, ĉar ĝi estas la tombo de la „Pomerela Libereco“.

La „Germana Kavaliordeno“ unufoje vizitante tiun ĉi regionon, sin enkondukis kun kruelaj kaj malbonaĵoj.

Sin intermiksinte inter du malpaĉiĝintaj partioj batalantaj, ĝi por ambaŭ partoj fariĝis timinda malamikoj.

Tro malfrue la nobeluloj konsliĝis, kiom ili malutilis al si mem, petante la kavaliordenon pri helpo.

En la Danziga kastelo la nobelularo kolektis ĉiujn siajn militistojn al energia batalado malespera. Vane! Ili estis venkitaj de la malamlikoj strategie pli lertaj.

Ĉiuj mortis batalantaj, nur dekse restis vivantaj; sed je tiuj dekse la ordenkavaliroj sin volis venĝi, por ke en la tuta loĝantaro unu fojon por ĉiam estu sufokigitaj ĉiuj deziregoj kaj sopiroj al libereco.

Vane la maljuna honorinda abto de l' monaĥejo Rüdiger aplikis sian tutan elokventecon por konvinki la kavalirojn, ke iliaj malamlikoj ja ankaŭ

Samideanoj, kiaj ajn estus la invitoj, kiaj ajn estus iliaj promesoj, neniu el ili povas egali *Varsovion*. Al ni, plej kara! Al ni, Samideanoj!

Ne kun laŭtaj, bruaj vortoj ni al vi venas. Ne kun pompaj promesoj. Ne kun altaj ranguloj ni prezentiĝas.

Modeste, senbrue, kiel ĉio en Esperanto, kiel tuta ĝia historio, kiel la vivo de nia Majstro, modeste ni venas vin inviti. Ne al baloj kaj festoj! Ne al gloroj kaj triumfoj. Ne al pompoj kaj paradoj!

Nur al kvieti, silenta tombo! Al tie, kie en plej granda trankvileco kuŝas nia modestega kaj humila geniulo. Al tie, kie reĝas la absoluta justeco kaj ĉiuj estas egalaj.

Ni, Varsovianoj, vin invitas.

Ĉu vi rifuzos?

Neniam!

Alvenu grandare! Alvenu amase! Niaj brakoj estas malfermitaj!

Varsovio geografie estas la koro de Eŭropo. Varsovio la koro de l' Esperanta mondo. Varsovio — lulilo de Esperanto. Varsovio la urbo de eminentuloj (Majstro, Grabowski, Kabe, Zakrzewski, Belmont k. a.). Varsovio la urbo de unuaj Esperantistoj. Varsovio la urbo de nia Majstro. Varsovio la urbo entenanta la tombon de Majstro. Varsovio — kun tombaro de Esperantistaj famuloj...

Varsovio la plej granda martirino inter ĉiuj aliaj historiaj urboj, Varsovio la plej maljuste ofendita de l' sorto, Varsovio la regajntino de sia animo, la pola, pure poluja Varsovio invitas.

Ĉu iu rifuzos?

Ĉu Varsovio, kie estas „konkordo“ en la „laboro“ de l' „polaj Esperantistaj societoj“, ne meritas? Ĉu Varsovio povus malsukcesi? Neniam!...

Kaj vi venos.

Varsovio, la 20. junio 1922.

Edvardo Lonkopolanski.

Pri la projekto de Universala Ligo Esperantista (kp. ET 90).

Ligo kaj Lingvaj Organizaĵoj.

La ĉapitroj I kaj VIII de la projekto fiksas la rilaton de la Ligo al la oficialaj lingvaj organizaĵoj (Lingva Komitato kaj Akademio): La Ligo donos subtenon al la L. O. (ĉap. I). La Ligo ricevos la rajton „nomi“ (=proponi?) al la Akademio kandidatojn por la L. K.; sed la L. K. restos aŭtonomia (ĉap. VIII).

La L. K. antaŭ nelonge voĉdonis kontraŭ sinreorganizo. Laŭ la ĝisnuna regularo sole la jamaj membroj mem decidis pri akcepto de novaj membroj.

La Ligo kaj la Esperantistaro estos unu. La Ligo-Esperantistaro ebligos la ekziston de la L. O. Al ĝia konsisto ĝi ne havos faktan influon. La konsisto de la L. O. fakte dependos nur de ilia pli malpli hazarda konsisto en la tempo de l' fondiĝo antaŭ kelkaj jarkvintoj; t. e. de la kompreno, volo kaj loĝloko de tre malmultaj personoj.

Se tiuj personoj iamotivie ne volos, ili ne bezonos akcepti kandidaton prezentitan de la Ligo, do deziratan de la Esperantistaro. Se iliaj loĝlokoj estas malproksimaj de la lia aŭ se ili mem ne estas altnivelaj, ili eĉ ne ĝuste takas lin. Generale: La L. O. povos iri volon tute alian ol dezirus la Internacia Esperantistaro-Ligo, mem demokratie organizita.

Konkludo: La Ligo-Esperantistaro ebligas la realan ekziston de la Lingvaj Organizaĵoj kaj donu al ili fidon kaj konfidon. Sed interŝange

estis Kristanoj, ke ili do nur bataladis por la honoro de sia patrujo, li atingis nenion pli ol la permeson, doni al ili la lastajn sakramentojn, akompani ilin al la ekzekutejo kaj pretigi al ili tombon en sanktigita tero.

Jen sub tiu deklivo ili dormadas la dormon eternan.

ĝi havigu al si garantiojn, ke la L. O. laboros konforme al la deziroj de la Esperantistaro.

Tiu garantio povas esti duspeca: Aŭ la L. O. mem reorganizos sin antaŭ la definitivigo de la Ligo-statutoj; interne de la landaj societoj aŭ Esperanto-Institutoj tiam lingvaj sekcioj devus esti starigitaj, kiuj per sistemo de selekto elkribus taŭgajn kandidatojn por la L. O. Aŭ la Ligo mem ricevos la rajton akcepti kandidatojn. U.

Esperanto en Pola Lando.

ALEKSANDROW. Fondiĝis filio de Varsovia laborista societo „Laboro“ inter germanaj laboristoj. Fervore propagandas s-ano K. Brajer.

BYDGOSZCZ. Du novaj kursoj: pollingva (16 p.), germanlingva (12 p.), gvidataj de s-ano Prengel. Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj estas gajnataj dum la lasta ekskurso de societo „Esperanto“ al Ostromecko, kie oni sukcesis kolekti kelkajn mil mk. por Esp. flago.

Nuna prezidento de la Societo „Esperanto“ estas s-o Hinc. Mardon, la 27. junio, okazis la inaŭgura kunveno de Bydgoszcza s-ano en la nova „Esperanto-Hejmo“ (restoracio „Falstaff“) ĉe str. Dluga 45, afable transdonita al daŭra uzado por la loka s-ano de la restoracioposedanto s-ano Schultz. Ĉestis la inaŭguracion en la bele ornamita „Esperanto-Hejmo“ ĉirkaŭ 100 p., interalie s-ano Hiller el Lodz, kiu salutis ĉiun en al nova hejmo en nomo de „Lodz Esp. Societo.“ „Pola Esp. Servo“ eldonis helpe de „Aŭtodidakta Universitato“ la tradukon pollingvan de la „Manifesto al Instruistaro Tuimonda“. La manifeston oni dissendis al la tuta instruistaro de urbo Bydgoszcz, al la delegitoj de UEA en Polujo kaj al ĉiuj Esp. societoj, kies devo estas nun amase disvastigi la manifeston, valoranta pli multe ol ĉiuj longpaĝaj flugfolioj. S-anoj dezirantaj ĝin ricevi, ensendu al Pola Esp. Servo, Bydgoszcz, Kordeckiego 1a, la sumon de 15 pmk. po ekz.

LESZNO (Poznan). Dank' al klopodoj de s-ano Monarszynski aperas regulaj Esp. anguloj en kaj pri Esp. en ĵurnalo „Głos Leszczyński“. Novan kurson kun 40 seminarianoj gvidas s-ano Fr. Król.

LODZ. La loka kongresa komitato por la dua tutpola kongreso, okazonta dum venonta jaro, jam nun efike laboras por ĝia bona sukceso.

LUBLIN. Fondiĝis filio de „Laboro“ kun 26 membroj. Novan kurson partoprenas ĉirkaŭ 26 p. Ekzistas biblioteko.

PELPLIN. Propagandas s-o Alfons Mechlin en Collegium Marianum.

POZNAŬ. Malfermiĝis „Informa Oficejo“ ĉe str. Pocztowa 4. S-ano Lewandowski faris dum lasta societa kunveno interesan paroladon pri „Esperanto ĉe Ligo de Nacioj“. Okazas du kursoj.

WARSAWA. Lerneja ekspozicio ĉe lernejo de Rej kun aparta Esp. fakto, menciita preskaŭ en ĉiuj Varsoviaj gazetoj. — Vizitis la urbon s-ano Hudson el Aŭstralio. — Societo „Laboro“ legaligis kiel tutlanda societo per decido de Ministerio por enlanda aferoj n-o 679. — Prez. de „Pola Esp. Societo“ fariĝis s-o prof. d-ro Bujwid, kiu estas samtempe prez. de la dum la unua tutpola kongreso starigita „Federacio de Esp. Societoj en Polujo“.

La 29. junio okazis la unua estrara kunsido de la dum la tutpola kongreso fondita „Federacio de Esperantistaj Societoj en Pollando“. Oni preparis la starigon de diversaj fakoj de la Federacio, la preparon de la XV-a internacia mondkongreso de Esp. en Warszawa kaj kelkajn aliajn tre gravajn aferojn. Detalaĵoj komunikotaj per speciala cirkulero.

WOLKI ap. Wilno. Dank' al fervora propagando de s-ano Zielenkiewicz fondiĝis filio de Varsovia „Laboro“.

Pola Esperanto Servo.

Palestina Letero.

En la germana hospico S-ta Karlo en Haifa estiĝis malgranda hejmo Esperantista, kie ĉiudimanche vespere progresintoj havas okazon por pliperfektigi per interparolado kaj komencantoj trovas sindonon gvidanton. Je la dispono de la vizitantoj estas ĉiam krom la ŝatata „Esperanto Triumfonta“ kelkaj aliaj revuoj, libroj, broŝuroj ktp.

Laŭ lasta oficiala statistiko de januaro 1922 Palestina lando ĝis la Jordano entenas 762 000 enloĝantojn. 585 000 estas mahometanoj, 88 000 kristanoj, 81 000 judoj, 7213 druzoj kaj samaritanoj. La plej popolriĉa distrikto estas Jeruzalemo (Bethlehem, Hebron kaj Jeriĥo). Sekvas la distriktoj de Jaffa, Samaria (Nablus), Phoenicia (Haifa kaj Akko), Galilea (Nazareth, Tiberias kaj Safed), Gaza kaj Birseba.

La judoj formas plimulton en la urboj de Jeruzalemo (52%) kaj Tiberias (66%). La nova urbo Tel Aviv apud Jaffa estas nepre juda. La kristanoj estas la plimulto en Bethlehem kaj Nazareth, la mahometanoj en ĉiuj aliaj urboj.

Transjordanio daŭras esti malkvieta kaj ribelama en multaj regionoj, malgraŭ la ŝatata generalo Rikabi antaŭ nelonge sendita kiel adjutanto de l' Emiro Abdullah, por kiu nun estas konstruata palaceto apud Amman.

Pro malkvieto de la lando du pastroj katolikaj estis devigataj forlasi siajn parokanojn. Monsinjoro Barlassina, patriarko Jeruzalema, devas baldaŭ reveni de Romo kaj Londono, kien lin sendis la Vatikano por plendi pri kresko de malmoraleco kaj manko de senpartieco en tribunalaj aferoj de la nuna administracio de Palestina.

Haifa, junio 1922.

P. E. S.

IX-a Japana Esperanta Kongreso.

Nun en Tokio estas malfermita la Ekspozicio por Paco. Utiligante tiun ĉi okazon, japanaj Esperantistoj aranĝis IX-an kongreson specialan.

Unua tago. Vendredo, 12. majo.

Vespere je 7 h. Ĝenerala Kunsido en Gakuŝikai. Prezidis s-o Juri, studento de Tokia Komerca Universitato. Oni diskutis pri sistemo de Esperantaj institucioj en Japanujo; ĉeestis 60 personoj.

Dua tago. Sabato, 13. majo.

Posttagmeze je 1 h. Propaganda Kunveno kun paroladoj en Meiji Kaikan; 600 aŭskultantoj. D-ro Oka vokis: Studu latinan lingvon tiu, kiu volas esti aristokrato! Studu Esperanton tiu, kiu volas esti demokrato!

Je 7 h. Komuna Vespermanĝo en Takaratei; ĉeestis 60 p. Sub lerta prezido de s-o Ga, delegito de UEA en teritorio Japanujo, estis viglaj kaj interesaj paroladoj.

Tria tago. Dimanĉo, 14. majo.

Vizito al la Ekspozicio. 60 gesamideanoj kolektiĝis antaŭ la enirejo de la Ekspozicio je 10 h. matene kaj kune transiris la Ekspozicion.

Je 7 h. Amuza Vespere kun manĝo en restoracio „Kuma“ (Urso), Arakusa Parko. 60 gesinjoroj gaje interbabiladis. Prezidantop estis s-o Kolzumi, studento de Waseda Universitato.

Raportilo:

La Eksterlanda Sekcio de Japana Esp. Instituto.

Okazontaj Kongresoj.

II-a Orient-Nederlanda Esp. Kongreso.

La 10. sept. 1922 la Esperantistoj el Orient-Nederlanda kunvenos en unu el la plej belaj urboj de Nederlando, en Arnhem. Tie ankaŭ okazos de 6.—13. sept. Esp. Ekspozicio en la fame konata centro de la urbo „Musis-Sacrum“. Grandaj reklamiloj, montrantaj sub la teksto siluetojn de la urbo, diskonigas la okazontajn ĉie en la lando, kaj la kongreso promesas fariĝi vera propagando por Esperanto en la dirita regiono. Informojn oni petu de: Orient-Nederlanda Esperanto-Kongreso, Velpenweg 52, Arnhem.

II-a Rumanlanda Esp. Kongreso

okazos la 8.—10. julio en Cluj (Kolozsvar, Klausenburg) sub la protekto de s-o C. Banu, ministro de kultoj kaj artoj.

Hungara Esp. Kongreso en Miskolcz.

La Hungarlanda Esp. Societo aranĝos ĉi-jaran landkongreson en Miskolcz. Samtempe estos aranĝata granda Esp. Ekspozicio, por kiu oni petas alsendon de ĉiuj specialaj Esperantaj: libroj, gazetoj, afiŝoj, komercaj katalogoj ktp. Oni bonvolu signi tiujn objektojn, kies sendon oni deziras. Antaŭe dankas la Loka Kongresa Komitato (adr.: Abbazila Hotelo N-o 55, Miskolcz, Hungario).

Helsinki, Lübeck, Danzig.

Ankaŭ je tiu ĉi loko ni atentigas, ke estas urĝa tempo por aliĝi al la Universala Kongreso en Helsinki aŭ almenaŭ al la Antaŭkongreso en Lübeck aŭ Danzig. Ne prokrastu vian aliĝon ĝis la lasta tago!

Kongreso Breslaŭ.

Korektu en nia antaŭa numero, ke la poŝt-ĉekkonto Breslau 528 estas tiu de la firmo Gebr. Barasch. Phot. Abt., Breslau I.

Foiroj.

Skånemässan.

Skånemässan, la Foiro de Skanio, okazos de 31. julio ĝis 6. aŭgusto en Malmö, Svedlando. La foiro estas grava merkato de svedaj kvalitoj. Ĉiuj branĉoj de industrio kaj metio. La foiro estas membro de la Sveda Asocio por Internacia Komerca Lingvo (F. I. H.) kaj uzas Esperanton en korespondado kaj reklamo. Ĉiuj klarigoj de la Foirooficejo, Kalendegatan 5, Malmö, kaj de la sekr. de F. I. H., s-o L. Tell, Prästgårdsgatan 42, Stockholm S6., kiu estas la oficiala reprezentanto de la foiro ĉe la Kongreso en Helsingfors.

(Internaciaj kaj naciaj gazetoj bonvolu represi! Koncernaj gazetonumeroj estos dankeme ricevataj. Ĉiuj kostoj estas pagotaj. Sendu al „Förbundet för ett Internationellt Handelspråk, s-o L. Tell, Stockholm, Sved., Prästgårdsgatan 42.

Reichenberg (Ĉeĥoj.)

La foira oficejo dissendis al 1500 germanaj gazetoj scilgion „Kuniĝo de la Internaciaj Foiroj kaj Esperanto“, — pruvo, ke la foira estraro estas konvinkita pri la uzbleco de Esperanto. Estas imitinda ekzemplo. Ĉiuj Esperantaj entreprenoj subtenu en simila maniero nian movadon, kaj ili helpu propagandi por la disvastigo de Esperanto. Ambaŭ partioj profitos.

La Orienta Foiro Budapest

disponigis senpage lokon por Esperantaro en la nunjara foiro de 17. junio ĝis fino de la monato. Multaj eksterlandanoj ĉeestis. En la katalogo estas aparta Esperanta paĝo.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Por „Esperanta Ligilo“

donacis: 227. Hagaj Esperantistoj 2 1/2 hfl. — 228. Dotnava Esp. Rondeto „Verda Kverko“ 100gmk. 229. G. v. Heek, Hengelo 200 gmk.

„LA KONTRAUVOLA KURACISTO“ de Molière en „La Verda Kato“ en Paris.

La glora franca aktoro kaj verkisto Molière (1622—1673) apartenas al la vico de grandaj verkistoj, kiuj estas propraĵo ne nur de sia nacio, sed kies ĉefverkoj vivas trans la limojn kaj la epokojn. Nek la tempo, nek la spaco, nek la vivo, evoluiĝanta kaj ŝanĝanta formojn, povas senkolorigi, senvivigi aŭ pereigi ilin: la tipojn kreitajn de Molière oni renkontas en la ĉiutaga vivo, sub alia kostumo aŭ aspekto. Jen kio eidentigas, kial la tricenjara datreveno je Molière estis festita en februaro en la tuta mondo.

Molière estis vera pentristo de la homa karaktero, rimarkinda pro la alta reliefo kaj originaleco de siaj karakteroj, perfekta konkordo de la scenoj, komika forto, ŝprucanta sprileco kaj nireproĉebla stilo. Liaj verkoj enhavas la tutan gamon de la arto, de burleskaj farsoj ĝis la plej alta komedio, en kiuj pasas homoj, kies nomoj aŭ vortoj eniris en la ĉiutagan vivon. La ĥipokrita Tartuffe, la malgaja Misanthrope, la nobel-ambicia burĝo („le Bourgeois-gentilhomme“), la senama avarulo Harpagon, la ruza servisto Scapin kaj multaj aliaj havas nun komunan nomon kaj vivas inter ni.

Musset, konata franca verkisto de la XIX-a jarcento, majstre difinis la gajecon de Molière: „Quelle mâle gaieté, si triste et si profonde, qu'à

Abonejo de ET en Nederlando.

Al nederlandaj samideanoj ni sciigas, ke abonojn kaj reklamojn por ET akceptas s-o J. Ravestein jr., v. Aerssenstraat 200, Hago.

Por la Tomboŝtono al D-ro Zamenhof la Dotnava Esp. Rondeto „Verda Kverko“ donis 100 gmk.

Franca ministro de l' publika instruado kontraŭ Esperanto.

S-o Léon Bérard, ministro de la publika instruado, dissendis ĉirkuleron, en kiu li malpermesas poresperantan propagandon en ĉiuj lernejoj. (Laŭ la Pariza „Le Journal“ de 28. junio.) La argumentoj, represitaj de la ĵurnalo, similas lomi al tiuj de Prof. Palme en ties lastjara raporto al la prusa ministro de l' komerco.

Laborista Esperanto Asocio Germanlingva. La Germ. Lab. Esp. Asocio ŝanĝis sian oficialan nomon je Laborista Esperanto Asocio Germanlingva (Arbeiter-Esperanto-Bund für das deutsche Sprachgebiet). La oficejo de la asocio troviĝas nun en Breslau 8, Vorwerkstr. 62.

Pri intencita vojaĝo tra Eŭropo

de s-o Adalberto Smit el Arnhem, Nederlando, s-o Smit sciigas al ĉiuj, kiuj bonvolis inviti lin, ke la vojaĝo pro familiaj cirkonstancoj devas esti prokrastata.

La Esp. Oficejo de Lyon (ĝis nun 36, rue Victor-Hugo) troviĝas nun 30, rue Ferrandière kaj estos, kiel ĝis nun, direktata de s-ino Farges. Je la sama adreso funkcias la Grupo Esperantista de Lyon kaj ties estraranoj, kaj la delegitaro de UEA.

Altrohlaŭ apud Karlsbad, Ĉsl.

S-o Uibert, sub-poŝtdirektoro en Karlsbad, faris la 9. junio paroladon pri Esperanto en Altrohlaŭ. Oni decidis, en aŭtuno komenci Esp. kurson kaj fondi grupon. Inter la aŭskultantoj oni rimarkis multajn oficistojn.

„Der Bund“ (La Ligo).

La „Messzeitung“ (Foilgazeto) de Frankfurt, kiu dum sia trijara ekzistado fariĝis multe legata kaj vaste disvastigita organo komerc- kaj ekonomipolitika, aperos de 1. julio sub nova titolo „Der Bund“ (La Ligo) kiel komuna organo de Hamburg-Ameriko-Linio kaj de la Frankfurta Internacia Foiroj.

Laboristaro.

Alvoko al la laborista junularo gesperantista tutmonda.

La 19.—21. aŭgusto okazos en Salzburg (Aŭstr.) internacia kongreso (renkonto) junulara. Mi intencas nun, per helpo de ceteraj gesperantistaj junuloj inter la socialista internacio junulara fondi Esperantan sekcion. Tial mi petas ĉiujn je kunhelpo kaj proponoj, sendotaj al Josef Eder en Graz, Aŭstrio, Lastenstr. 6, II-a eĝ., Stiro.

Fervojistoj.

La IV-a Kongreso de Svisaj Fervojistoj, kiu okazis en Bern la 17. kaj 18. junio, decidis apogi la movadon por lingvo internacia kaj rekomendi al ĉiuj membroj de la Federacio la lernadon de internacia lingvo.

Italio.

Esperanto progresas inter la italaj fervojistoj. Post fondo de Esp. Ferv. Unio en Torino (1920) oni fondis novajn Esp. fervojistajn grupojn en Roma, Voghera, Cremona, Rivarolo, Venezia, Trieste, Mantova ktp.

l'entendre rire on voudrait en pleurer“ („Kia vira gajeco, tiel malĝoja kaj profunda, ke, aŭdante, ke ĝi ridas, oni volus plori“).

Kelkaj verkoj de Molière, kiel „Georges Dandin“ kaj „La kontraŭvola edziĝo“ (ludita dum la Boulogna kongreso) jam estas konataj de la tutmonda Esperantistaro.

La Pariza Esp. kabareto „Verda Kato“, kies reputacio ne bezonas plu reklamon, ludis kun sukceso la 24. majo, antaŭ plena ĉambrego, „La Kontraŭvola Kuracisto“, en la kostumoj de la epoko. S-o Le Cornec estis la ĉiam ebria lignohakisto Sganarelle, el kiu la ĵaluzemo de lia edzino,

Martine (f-ino Gérard), kiu emas esti batata de sia edzo, faris gravegan kuraciston. S-o Dubois prezentis perfekte vilaĝanon Lucas, kies ordinarco tute kontrastis la ĉarmon de lia edzino, Jacqueline (f-ino Marga Rineta). S-o R. Schwartz, la ĉefregisoro de „V. K.“, estis Valère, fidela servisto, de la grava nobelulo Géronte (Gaborj), kies flino Lucinde (f-ino Le Cornec) energie batalis kontraŭ la decido de sia patro kaj fine edziĝis al sia amanto Léandre (Ruhlman). La aliaj aktoroj: Robert (Nels), Thiébaud (Solsona) kaj Perrin (Bach) inde plenumis siajn rolojn. Eble, iam alvenos tago, kiam „La Verda Kato“ povos koniĝi al la internacia Esperantistaro. A/o.

Postkongresa vizito en Stockholm 18.-19. aŭg.

Al nia komuniko de 29. 5. 1922 ni nun povas doni la informon, ke la Eksterlanda Ministerio de Svedio deklaris, ke ĉiuj svedaj legacioj estas ordonitaj doni svedan vizon sen formalajtoj, kiam oni montras la finnan kongreskarton. Ordinara pago.

Faru tial posikongresan viziton en „La Venezio de l' Nordo“!

29. 6. 1922.

Por la loka komitato

Leander Tell,
Prästgårdsgatan 42
Stockholm S6.

Polico.

Oficiala Ekzameno de Budapeŝtaj Policistoj.

La 29. majo estis la solena fermo de la unua oficiala, per ministeria ordono permesita Esperanto-kurso ĉe la ĉefpolicejo de Budapeŝt. Proksimume 30 policistoj, plejparte oficiroj kaj detektivoj, finis sub gvido de kapitano Kéthelyi la kurson kaj decidis fondi apartan grupon. Ĉeestis, reprezentante la poliestraron, ĉefpolickapitana anstataŭanto D-ro Adalberto Solt kaj, reprezentante la ministerion de internaj aferoj, pens. ĵuĝisto D-ro Adalberto Rácz de Kövesd kaj aliaj alirangaj policoficiroj. La polica kantistaro kantis la hungaran himnon. Sekvis la ekzameno, je kies fino nova Esperantisto-policisto, sesdekjara sinjoro, per Esp. parolado salutis la instruanton, kapitanon Kéthelyi, kaj sinjorino transdonis por danki florbukedon kun arĝenta cigaredujo. Post dankaj parolado de s-o Kéthelyi kaj promeso de D-ro Solt, ke li raportos pri la afero kaj promesas subtenon pere de la poliestraro, la polica kantistaro je ĉies miro kantis la Esperanto-himnon, kio forte impresis la gastojn.

Tramvojo.

Tramvojlita Unuiĝo Esperantista en Vieno.

La 8. junio fondis la partoprenantoj de la kvin kursoj de s-o R. M. Frey la sukcespromesantan „Tramvojlita Unuiĝo Esperantista en Vieno“. La bone vizitatan kunvenon ĉeestis s-oj Frey, Siedl (kiu printempe 1921 gvidis la unuan kurson por tramvojlitoj), d-ro Sós kaj direktoro Schmanek. La direkto de la urba tramvojo sendis kiel oficialan delegiton s-on d-ron Bäcker, kiu fervore paroladis pri la kreskanta Esp. movado inter la vienaj tramvojlitoj kaj promesis en la nomo de la direkto eflakplenan subtenon. Ĉeestis ankaŭ la konataj Esperantistoj red. Schröder, s-oj Sikor, Schade kaj Zimmermann. Rimarkinda estis Esp. parolado de s-o Lorber, tramvojlito. Paroladis plue la organizantoj, prez. Wehsely, vicprez. Berdau kaj s-o Frey, kiu substrekis la grandan signifon de la nova unuiĝo precipe rilate al la estonta kiel eble plej internacia fakkongreso de Esp. tramvojlitoj okaze de nia XVI-a en Wien (1924). La unuiĝo jam havas pli ol 100 membrojn. Instruontaj tramvojlitoj por la venonta vintro ĉe la vagonarejoj jam 8.

* * *

Tramvojlitoj, kiuj povas sciligi pri la Esp. movado ĉe tramvojlitoj en diversaj urboj de la tuta mondo, bonvolu sin turni al la prezidanto de la Tramvojlita Unuiĝo Esperantista de Vieno, s-o Karl Wehsely, konduktoro, Wien 12, Steinhagegasse 3/11, Aŭstrio.

Parolejo.

119. Karaj samideanoj skandinavaj!

De kio dependas la sukceso kaj la enkonduko de Esperanto? De ni mem kaj de la laboro de niaj samideanoj. Ĉu ne forta Esp. movado en la Nordo estas dezirinda? Ĉu vi ne legis pri la allogoj kaj bonaj preparoj de la Internacia Kongreso en Helsingfors? Ĉu ni ofte havas la ŝancon en najbara lando persone partopreni internacian Esp. kongreson?

La mono en ĉiuj skandinavaj landoj estas altvalora. Persona sperto dum internacia kongreso estas la plej profunda konvinkilo pri la taŭgeco de Esperanto. Tial neniu skandinava Esperantisto devus manki. Viaj samideanoj el multaj landoj, kiuj jam anoncis la partoprenon, atendas vian konatiĝon kaj kuneeston. Tial vojaĝu al Helsingfors! Mi esperas vian revlidi.

Samideane

K. v. Frenckell,
Konsulo de Finnlando en
Dresden.

Gazetaro.

FINNLANDO. Dum aprilo 27 finnlndaj gazetoj aperigis 55 artikolojn pri Esperanto.

Medicamenta, majo 1922.

Bele presita monata revuo por farmacio kaj drogo-komercio. La direktoro Dr. Theophilus de Almeida estas Esperantisto. — Adreso: Medicamenta, Caixa Postal 899, Rio de Janeiro, Braz.

Gazet van Mechelen, Belg., 28. 6. (Longa artikolo sur unua paĝo pri „Het Esperanto“.)

Onafhankelijk Weekblad, Almelo, Nederl., 17. 6. (Kun la „Manifesto“ laŭ ET), 24. 6. (Pri mondvojaĝo de s-o Hudson). Nachrichtenblatt des Touristen-Vereins „Die Naturfreunde“, Gau Baden, Karlsruhe, Germ., julio-aŭgusto. (Artikolo de Montano pri la „movado de la naturamikoj kaj Esperanto“.)

Der Fussball-Sport (Piedpilko), Berlin, 26. 6. (Art. de H. Lemke pri Esp. kaj sportoj.)

Danziger Volksblatt, 10. 6. (Esp. angulo.)

Nowy Dziennik Białostocki, Białystok, Pol., 11. 6. (Detala raporto pri la I-a Tuipola Esp. Kongreso, de J. Sapiro.)

Le Cuir, Paris, 18. 6. (Detala raporto pri parolado de s-o Baudet en la Lernejo de Aliaj Komercaj Studoj.)

Le Matin, Paris, 20. 6. (Art. de juna konata verkisto José Germain.)

Hengeloo's Advertentieblad, 17. 6. kaj Twenthe en Hengelo Cour int., 21. 6. (Manifesto al la tutmondaj instruistoj, laŭ ET.)

Unser Volk, Krefeld, 25. 6. (Esp. angulo.)

Volksville, Hannover, 21. 5. (Art. „Homarlingvo“ de Dr. W. Fricke, kun traduko de art. el ET.)

Auerbacher Zeitung, 30. 6. (Esp. kongreso en Breslau.)

Reichenberger Zeitung, 10. kaj 12. 6. (Art. pri kongreso de ĉel. Esperantistoj en Brunn-Bruno.)

Jutarnji List, Zagreb, 17. 6. (Art. pri Esp. konferenco en Genève.)

Recenzejo.

LIBROJ.

FUNDAMENTO VAN ESPERANTO. Tradukita de Frans Schoofs. Eldono flandra-holanda de l' Fundamento de Esperanto de D-ro L. Zamenhof. 114 pĝ. 11 x 17 cm. Paris, Esperantista Centra Libroj, 51, rue de Cligny. 1922. Prezo: verde broŝurite 2 fl.

Estas dankinda fero de nia fervora belga pioniro Schoofs, ke li forigis la mankon de holanda eldono de nia Fundamento. Krom la Zamenhova kvinlingva eldono (franca-angla-germana-ruŝa-pola) ni posedas nun boheman, grekan, hungaran, rumanan, it alian, japanan, turkan kaj flandra-holandan tradukojn. — Niaj nederlandaj samideanoj ne hezitu havigi al la libron aĉeteblian ankaŭ en Antwerpen kaj a-Gravenhage. (G. Ajul.)

KRIOJ DE L' KORO. Originale verkis Salo Grenkamp-Kornfeld. 80 pĝ. 10 1/2 x 16 cm. Eldono: Esperanta Voĉo, Jaŝlo (Polujo) 1922. Prezo: broŝ. 10 gmk.

Rememorante la tempon, kiam amsoprioj paroligis verse la junulan koron, mi traiegis la libron de nia simpatia pola amiko Grenkamp. Dudek-kvin mallongaj skizoj en versoj kaj prozo, veraj krioj de l' Koro, kvazaŭ taglibro de animo prezentas homajn sentojn en delikateco netuŝita. — Kvankam mi ne estas poeto, mi bone komprenas la verkinton kaj lian vivĝojn. — E. L. A. rekomendas la versaŝon. Sur la paĝo 9-a mi trovis eraron gramatikan: tempon pasitan (anstataŭ pasintan!) (G. Ajul.)

GAZETOJ.

Novaj Tempo. Junio. Revuo de Popoledukado. Adreso: K-do Vittecoq, Sassetot par Bacqueville (Seine Inférieure), Franc.

Brazila Esperantisto. Marto-aprilo.

La Suda Kruco. Aprilo.

Holandana Esperantisto. 22. kaj 29. junio.

Amerika Esperantisto. Junio.

Hispana Esperantisto. Aprilo-majo. Adreso: S-o Julio Mangada Rosenörn, komandanto de Inf. Reg-io „Galicia“ 19, Jach (Huesca), Hisp.

Bulgara Esperantisto. Aprilo-majo.

Bizantio. Marto-aprilo, 52 paĝa ilustr. kajero en lingvoj Esperanta, greka kaj franca.

Informa Bulteno de „Barcelona Esp. Societo“. N-o 5.

Skandinava Esperantisto. Junio.

Nova Tagiĝo. Aprilo-majo.

Germana Esperantisto. Julio.

Hungara Esperantisto. Junio.

Vegetarano. Julio.

AFIŝOJ, PROPAGANDILOJ, ktp.

INFORMILO pri la stato de Int. Scienca Asocio kaj ĝia Revuo. Junio 1922.

Kun sciligo, ke la unua numero de Sc. Revuo aperos 48-paĝa en aŭgusto; raporto pri la agado rilate la novstarigon de ISA kaj Sc R.; diversaj artikoloj pri ISA kaj TEKA.

LISTO de libroj haveblaj ĉe Eldonejo „Esperantista Voĉo“ (Salo Grenkamp-Kornfeld) en Jaŝlo, Pollando.

FOIRO DE MALMÖ (Skåne-Mässan), Sved., eldona presitan propagandilon en kvin naciaj lingvoj kaj Esperanto.

Por Malbonvalutoj.

Pro denova plikariĝo, kaŭzita per la plua falado de la germana kaj kun ĝi de diversaj aliaj valutoj, ni devas por kelkaj landoj plialtigi la prezojn de abono kaj reklamo. Oni bonvolu legi la novajn prezojn sur la titolo de la hodiaŭa numero resp. en la noto super la anoncetoj. La novaj prezoj validos komence de numero 95. Jam pagitajn abonojn kaj anoncetojn ni plenumos por la malnova prezo. Pro la sama kaŭzo ni ankaŭ devas jam nun plialtigi la kotizon por dumvivaj abonantoj el malbonvalutaj landoj je gmk. 2500. De jam pagintaj ni ne postulas postpagon.

Estas la plej urĝa tempo por aliĝi al nia XIV-a Kongreso okazonta en Helsinki-Helsingfors, Finn!

Jus aperis
eldonita de Księgarnia Robocznica
(Laborista Librejo), Warszawa, ul.
Wspólna 17, Polio:
Ekzilo

Rememoroj de Aleksy Rzewski.
Esperantigis kun permeso de la aŭtoro
K. Domosławski.

La aŭtoro, estinta Lodza laboristo, estis kiel fervora ano de socialista partio dum la revolucio de 1905 j. arestita de la rusa registaro kaj ekzilita Siberion. Forkurinte de tie en 1907 j., li laboradis ĝis 1912 j. en diversaj urboj de Francio kaj Germanio. El tiuj tempoj devenas liaj tre interesaj rememoroj.

En nova liberiginta Polio R. estas unu el la plej amataj ĉefoj de pola laboristaro. En sia hejmurbo Lodz li estas elektita je urbestro. Estante mem Esperantisto, li varme subtenas nian movadon kaj estas elektita kiel honora komitatano de la 1-a Tutpola Esp. Kongreso.

Prezo de la 58-paĝa libreto afranke 0.50 svis. fk. aŭ egalvaloro. Por malbonvalutaj landoj 25% rabato.

Esperanto Service Corporation
„Esko“
500 Fifth Avenue New York City
Telegrafa adreso: Esperanto New York.

Aĉeto, eksporto, importo kaj maklerado de ĉiujpecaj komercaĵoj.

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estas danke ricevataj

POŝTMARKOJ!

Danzig I, 5 Pf.-5 Mk. (14 ekzempleroj, germana eldono)	1 serio	10 ser.
Danzig III, 5 Pf.-10 Mk. (10 ekz.) konstitucio	90.—	800.—
Danzig aerpoŝto I, 0.40, 0.60, 1.—	25.—	222.—
Danzig aerpoŝto II, 40Pf.-5Mk. (5 ekz.)	20.—	180.—
Danzig tuberklozo (3 ekz.)	15.—	120.—
Danzig provizoroj 5/30-80/30 (5 ekz.)	15.—	140.—
Ŝlesvigo 2 1/2 Pf.-10 Mk. (14 ekz.)	70.—	600.—
Supra Silezio I, 2 1/2 Pf.-5 Mk. (9 ekz.)	65.—	600.—
Supra Silezio II, 2 1/2 Pf.-5 Mk. (17 ekz.)	40.—	360.—
Saar I, 2 Pf.-1 Mk. (17 ekz.) Sarre	360.—	3400.—
Saar II, 5 Pf.-10 Mk. (21 ekz.)	120.—	1000.—
Saar III, 5 Pf.-25 Mk. (16 ekz.)	320.—	—
Pariza eldono	60.—	550.—
Memel aerpoŝto, 80 Pf., 1.—, 2.—, 3.—, 4.—	90.—	820.—
Memel (franca eldono) 5, 10, 15, 20, 30, 40, 50, 60, 80 Pf., 1.—, 1.25, 2.—, 4.—, 10.— Mk.	80.—	700.—
Memel (franca eldono) nova 25, 40, 75 Pf., 1.—, 1.25, 1.50, 2.—, 5.—, 6.—, 9.— Mk.	50.—	450.—

70 diversaj poŝtmarkoj de Danzig, Saar, Memel, Supra Silezio
25 diversaj paroj da germanaj „Têtes-bêches“ kaj erarpresoj

La prezoj en germana marko. Mi kalkulas: 100 germ. mk. = 0.50 dolaro, 1 guldeno, 1 1/2 ŝilingo, 1 1/2 sveda aŭ dana krono, 2 norvegaj kronoj, 2 svisaj frankoj, 2 1/2 pesetoj, 4 francaj aŭ belgaj frankoj, 7 litroj, 15 finnl. mk., 17 ĉ. kronoj, 310 hung. kr., 1500 pol. mk., 6600 aŭstr. kr.

Antaŭpago per monbiletoj de ĉiu lando (en registrita letero).

Afranko: eksterlando 10 gmk., Germanl. 5 gmk.

E. SCHULTZE, Rogzow bei Köslin, Germanlando.

S-ino Therese Husch.
Fabrikado de prezindaj artmetiaj
MANLABORAĴOJ,
ekz. „Jumper“-bluzoj, veŝtoj, trikitaj jakoj el silko aŭ lano, kusenoj, kafuto-capoj, arietrikaj kovriloj ktp., laŭ propra moderna kaj laŭ speciala dezirataj specimenoj.
Dresden A (Germ.) Parolebla:
Blasewitzerstr. 561 12-4 h.
(Ecke Fürststraße).

Mendu antaŭ nova prezaltigo!

Ni rekomendas el la Esperanta literaturo:
La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof 30 —
Heine, Libro de kantoj 4.50
Kress, Rozo sovaĝa 5.—
Möbusz, Dokumentoj 35.—
Puŝkin, Pafo 5.—
Schiller, Poeziaĵoj 2.40
Seidel, Viniro-fabeloj 15.—
Suttner, For la batalilojn 50.—
Thurston, La urbo de belega sensencaĵo 50.—
Tieck, Ekberto 8.—
Vazov, Bulgaraj rakontoj 6.—
William, Legolibro 12.—
Wisemann, Fabeloj 60.—
Zahn, Svisaj rakontoj 10.—

La prezoj en germana marko por malbonvalutuloj; por mezbonvalutuloj plipago de 60% bor bonvalutuloj plipago de 100% - Por afranko aldonu 30% germanoj 20%.

Butin & Jung, Godesberg
Mendojn por nia eldonejo oni ne direktu al „Esperanto Triumfonta“ resp. al s-o Jung en Horrem, sed nur al nia firmo Butin & Jung en Godesberg.

La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojoj jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Hérault), Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Oni postulu la „Victoria“-Eksport-preziston en germana-hispana aŭ germana-angla lingvoj.

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo
(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)
Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj an ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj.
Prokuras komercajn adresojn.
Prizorgas la anoncadon en Nederlando.
Interrilatis kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.
Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpaperoj.

Mi liveras ĉiujpecajn
Tolaĵojn
kaj
Luksajn Brodaĵojn
laŭ mendo, eventuale laŭ modelo.
Ilonoj Breuer, Győr, Hungarlando
Baross Str. 33.

Abonejoj de ET

en la landoj
Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 34
Belga: Frans Schoofs, 48, Kl. Beersiraat, Antwerpen. Poŝt-ĉeka n-o 284 20.
Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenau.
Estona: Est. Esp. Unuiĝo, postkasto 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Cligny, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Oirona, Vichy Catalan.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hafos-utca 15-II-2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb. Jezuitska ul. br. 1.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smeliu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Nederlanda: J. Ravestein Jr., v. Aerssenstraat 200, 's-Gravenhage.
Pola: Adolfo Oberholman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3128). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Kiu ne povas viziti la XIV-an Kongreson, vizitu almenaŭ Internacian Antaŭkongreson en Lübeck aŭ Danzig!

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj per minime du sivekval enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj 3.20 dol., 0.50 fl., 1 nord. kr., 1 sil., 1 svis. fk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 0 fl., 7 mk., 8 kc., 10 gmk., 50 hung. kr., 400 pmk., 800 aŭstr. kr., inter-nacie 5 stamp. resp. kup.; ĉe rektal abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonkanto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

FIANCĜO. Prof. A. Lacalendola, del. de UEA en Bari (Ital.), fianĝiĝis kun s-anino I-ino Teresina Neglia de Casamassima.

EDZIĜO. S-ano Bronislaw Kruszczyński, Bydgoszcz, Siemiradzkiego 10, edziĝis kun I-ino Stefania Ezopówna el Bydgoszcz.

EDZIĜON deziras bela sinjoro kun nigrahara fraŭlino. Bildeto estas aldona. Ofertojn laŭ ĉifro „Edziĝo“ peras la red. de ET en Horrem bei Köln.

POR ĈIU HOMO estas utile scii la signifon de sporto, komparata kun fizika laboro. Rigardu anoncon sur lasta paĝo de ET n-o 85!

ESPERANTO EKSPOZICIO. Por la konstanta migranta Esperanto-Ekspozicio de la Ligo de Germ. Esp. Grupoj en Ĉeĥoslovakio estas kolektata materialo; ĉiuj sendaĵoj estas laŭvalore kompensataj. Postulu la liston de niaj valoraj interŝanĝ-artikoloj! — Adreso: Fritz Michalek Reichenberg, Lerchenfeldstr. 20, Ĉeĥoslovakio.

LA DUA RUMANLANDA ESP KONGRESO okazos en Cluj (Kolozsvár, Klausenburg) la 8-10. julio. Eksterlandaj samideanoj estas bonvenaj. Adreso: Esperanto-Kongreso, Cluj, Rumanio.

IARKUNVENO de Croydon Esp. Societo okazos la 15. julio en la Surrey Hills. Gastoj bonvenaj.

SONORIL-KONCERTOJ. La plej famaj sonoril-koncertoj en la mondo okazos en Mechelen (Malines), Belglando. Petu la programon, sendante tri afrankojn de letero al eksterlando. Inform olcejo: Brueel 125, Mechelen.

ADRESSANĜO. Mi transloĝiĝis. Mia nova adreso estas: Horrem, Merodestrasse. — Eĉjo E.

KURT SCHEFFLER. — Samideano(in)o, kiu scias ion pri la sorto de s-o Kurt Scheffler, Esperantisto, antaŭ la milito loĝinta en Sakslanda vilaĝo Tannenbergsithal (poŝtoficjo Jägersgrün), estas tre petata sciigi al s-o J. Golubcov, P. O. Romanovka, Primorskoj obl., Petrovka, der. Linda, tra Vladivostok, Siberio.

LA REVUO. Mi serĉas „La Revuo“, 7-a jaro n-oj 2 kaj 4, 8-a jaro n-o 10. Pagas altan prezon. — Martin Blicher, Bredgade 65, III., Kopenhago, Danlando.

RUSOJ KAJ SIBERIANOJ. Atentu! — Sendu al ni vian fotografejon kaj 50 nedifektajn, plejble malamajn, neuzitajn kaj stampitajn poŝtmarkojn, kaj vi ricevos de ni 50 lumarkojn aŭ 12 belajn poŝtkartojn kun via portreto. — Ferna-Versand, Plauen i. V., Germanujo.

KURACISTVIVDINO akceptos du junajn, klerajn allandulojn. Plena pensio kaj familia aliĝo. Muzika kaj lingva instruado en la domo. S-ino D-ro Hempel, Dresden-A, Zoellnerstr. 19. Rekomendita de s-ino Marie Hankel.

KOMERCAJN INTERRILATOJN, eventuale reprezentadon de germaniaj (saksa) fabrikoj de tolaĵo, ŝtrumpetoj kaj tatmoda komercaĵo por sinjoroj serĉas solida importa firmo en Argentino! — Skribu al s-o A. Bartoš, Praha-Nusle 170-62, Ĉeĥoslovakio.

GRAVA INFORMILO por ĉiu korespondanto kaj kolektanto! BES'a Adresaro. Prezo 1.80 svis. fk. (sendkostoj 3 gmk.), por germanoj 35 mk. (sendkostoj 1.50 mk.). — Havebla ĉe Esperanto Eldonejo Butin & Jung, Godesberg, Germ.

Al s-o F. SPAUKE en BRESLAU. — Pro perdo de via adreso estas neeble al mi respondi. Sendu ĝin denove. Via samideano A. Ferrer-Calvo, Strato Asturias, 44, I. en Barcelona, Hispanio.

Korespondeo kaj Interŝanĝo.
Kelkaj membroj de nia laborista grupo deziras korespondi kun geksterlandanoj pri laborista Esperantista movado, moroj, artoj, interŝanĝoj poŝtmarkojn ktp. — Arbeiter-Esperantisten-Gruppe, Breslau V., Brandenburger Str. 16.

S-o Otto Herman, komercisto en Odorhei, Rumanio, Bulev. Reg. Ferdinand 55, deziras korespondi per letero kaj ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandanoj.

S-o Francisko Mark, komercisto en Odorhei, Rumanio, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandanoj.

S-o Alberto Baco, gimnaziano en Odorhei, Rumanio, str. Malom 4, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandanoj.

S-o A. Baesens, Mechelen, Belgujo, petas senkulpigon: pro grava studado li ne regule respondos al siaj korespondantoj dum julio, aŭgusto kaj septembro.

S-o Juan L. Ajubita, str. Luchara 10, Bilbao, Hispanujo, volonte interŝanĝos poŝtkartojn kaj leterojn kun ĉiulandaj samideanoj.

S-o Simon Gureviĉ, Bachmut (gub. Donbass), Ĥarjovskaja 65, Rusio, deziras korespondi pri diversaj temoj kun ĉiulandanoj per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj; interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-o Porcin József, Kovács J. nel Kossuth u. 25, Debrecen, Hungarujo deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj kun samideanoj de tuta mondo; ŝanĝas fotografaĵojn.

S-o V. Grasser, St. Margaretten apud Knittelfeld, Stirio, Aŭstrio, serĉas korespondajn interrilatojn kun samideanoj en Irlando, Skotlando, Norvegio, Grekujo kaj Palestino. Li Esperantlingve babiladas per leteroj, arte ilustritaj poŝtkartoj (bfl.) kaj laŭdezire interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-o Karl Hinkkanen, Pori, Länsi Esplanadi 26, Finnlando, deziras korespondi poŝtkarte (ilustr.) aŭ letere kun eksterlandanoj.

Fraŭlo (19 j.) Taisto Lindgren, Pori, Tiilitehtaanpuisto 4, Finnlando, deziras korespondi poŝtkarte (ilustr.) aŭ letere kun eksterlandanoj.

Hermann Brüggemann, teknikisto, Hagen i. W., Bergstr. 31, Germ., deziras korespondi pri ĉiuj demandoj per leteroj kaj interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn.

S-o Bruno Geisler, Neu-Paulsdorf 117 bei Reichenberg, Ĉeĥoslovakio, petas interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.

Poŝtmarkojn interŝanĝas kun la tuta mondo: Karl Starek, Trautenau, Roseggerstr. 4, kaj Otto Werner, maŝinfabrikejo „Herrmann“, Parschnitz ĉe Trautenau, Bohemlando.

Rudolf Piol, Trautenau, Bohemlando, deziras interkorespondadon pri ilia konstitucio kaj rilatoj al urba ĉef-societo Petas ankaŭ statojn.

Alfred Hübner, N. Albenndorf 12, Post. Marschendorf IV, Bohemlando, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn, poŝtmarkojn kaj gazetojn kun tutmondaj samideanoj.

L. Jürsson, instruisto de gimnazio, Haapsalu, Saksa 6, Estonio, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn de Eŭropo, prefere laŭ katalogo Michel 1921/22.

W. J. Bijlert, Nieuwe Schoolstraat 18, G., Den Haag, Holland, interŝanĝas poŝtmarkojn de ĉiuj landoj, escepte Polujo kaj Ĉeĥoslovakio.

Fariĝu Dumviva Abonanto de ET, pagante sesoblan jarabonon! (Malbonvalutuloj pagu 2500 gmk.)